# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2017




*Karaj niaj Legantoj, septembra kunsido de la E-societo de Ŝikago estis dediĉita al la someraj eventoj kaj aventuroj. Kvankam ni jam parolis pri la UK en Seulo, kiun partoprenis nia estimate s-ro Prezidanto, sed la informo abundas malgraŭ ĉio. Pri sia somera sperto skribis tri doktoroj de diversaj sciencoj (cerba science, biologio, fiziko), la kvara d-ro (astronomio) Amri Wandel el Israelo afable disponigis al ni sian mapon de la plena suna eklipso. Dankon al li. Oni devas mencii, ke interesa artikolo pri renoma pola astronomo Kazimierz Kordylewski (patro de la ESdŜ prezidanto L. Kordylewski) aperis antaŭ dek jaroj en la novembra n-ro de "Saluton!" (2007).*

*Agrablan legadon! Ankaŭ novembra numero promesas esti interesa.* –Viktoro-Redaktoro

## Vojaĝo al Nov-Orleano *de d-ro Eric "Esperanto" Killian*

Antaŭ tri jaroj mia edzo kaj mi decidis veturi per trajno al Nov-Orleano, kiu troviĝas 1,500 kilometrojn for de Ĉikago. Ni alvenis al la grandega centra stacidomo Union Station en la urbocentro de Ĉikago kaj vizitis ĝian imponan ĉefan halon. La loko estis fama pro freneza sceno el la filmo "La Netuŝebluloj", en kiu infanĉareto ruliĝis malsupren laŭ ŝtuparo dum registaraj agentoj kaj gangsteroj de la prohibicia epoko pafis unu al la aliaj.

Post vespermanĝo nia trajno ekveturis. Ni atingis nian kupeon en la supra etaĝo de vagono, aranĝis niajn aĵojn, kaj baldaŭ preparis nin por dormi. Estis du malfermeblaj litoj. Mi elektis la supran ĉar mia edzo estas iom malpli grimpema ol mi.




Mi neniam tranoktis en trajno kaj antaŭĝuis la sperton. Tamen ŝajnis ke la trajno nokte tiel plirapidiĝis ke la vagono komencis forte ŝanceliĝi. Nu, kutime mi estas iom maltrankviliĝema, do mi kuŝis tie, rekte sub la supro de la trajno, kaj kompreneble povis imagi nur ke mi estis ĵetota tuj el la lito sur la plankon. Min ĝenis ankaŭ la ofta hupado de la lokomotivo. Fine mi ekdormis.

Matene ni iris al la manĝvagono. Ni sidis ĉe tablo kun du pensiulinoj, kiuj multe veturis per trajno pro timoj pri flugado, timoj, kiuj malpliboniĝis post la atencoj de la 11-a de Septembro. Oni rekomendis al ni du pitoreskajn trajnitinerojn, unu laŭ la Kalifornia marbordo kaj alian – tra la Roka Montaro inter Seatlo kaj Ĉikago.

Ni tagmanĝis kun edzo kaj edzino loĝantaj ekster Nov-Orleano. Ŝi donis al ni sian profesian karton. Ŝi provizis florojn precipe por edziĝaj festoj. Ŝia oficejo troviĝis en unu el tiuj grandaj 19-jarcentaj domoj en iama plantejo de la Malnova Sudo. Oni povis lui la domegon por edziĝoj kaj aliaj eventoj. Ni silente aŭskultis ŝian prezentadon pri niaopinie malgaja loko por ĝoja festo.

Tra le fenestro ni rigardis la pejzaĝon ŝanĝiĝi. Ni pasis tra pinarbaroj en suda Misisipio, eniris Luizianon, kaj sekvis la marĉan bordon de lago Pontchartrain. Preter la lago situis urbo Nov-Orleano.


Taksio veturigis nin en la malnovan Francan Kvartalon al ĉarma, malgranda hotelo nur du stratojn for de la rivero Misisipo. Matene hupo de ŝipo vekis nin en nia komforta ĉambro sur la tria etaĝo. Ni matenmanĝis sur balkono sufiĉe granda por nur du seĝoj. El florkestoj sur ĉiu balkono pendis verdaj plantoj super eta naĝbaseno meze de mallarĝa korto. La plaŭdado de malgranda fontano flanke de la naĝejo eĥiĝis supren al ni.

Vespere ni iris al loka trinkejo fama pro ĝia malrapide turniĝanta verŝotablo. Ĉe tiu karusela bufedo ni bonŝance trovis sidlokojn. Mi mendis Sazerakon, la oficialan koktelon de Nov-Orleano, kaj ĝuis ĝian viskion kaj anizan likvoron dum ni rondiris. La trinketado ankoraŭ daŭris ĝis viro kun eta kamerao eksidis apud ni. Ni tri babilis iomete. Li devenis de Kansasurbo kaj ŝatis plonĝi en la Kariba Maro por fari subakvajn filmojn. Li iom filmis nin kaj alŝutis ĉion al Interreto, tamen estis tiel malhele en la trinkejo, ke ni estis nedistingeblaj. Domaĝe.

Multe de belaj memoroj de tiu vojaĝo restas kun mi. Granda arbo kun pendigita balancilo en la botanika ĝardeno. La skulptaĵo-ĝardeno apud la artmuzeo. La hispankolonia arĥitekturo de la Franca Kvartalo. Albina aligatoro en la bestoĝardeno. Bongustaj, malmultekostaj pladoj da rizo kun nigraj fazeoloj. La bonegaj ĵazkluboj kaj stratoj muzikgrupoj ludantaj por trinkmono en la strato Frenchmen.

Mi sopiras reiri al Nov-Orleano. La venontan fojon –aviadile!

# Suneklipso (1)




Laŭ mi, la homa populacio, loĝanta sur Tero, konsistas el du partoj. Unu, la tre malgranda grupo de la bonŝanculoj, kiuj havis la okazon travivi tiujn unikajn 2 minutojn en ilia vivo dum kiuj ili vidis tion, kion la dua, multege pli granda parto de la homaro eĉ tute ne havas ideon, kion ili ne spertis.

La Totala Suneklipso estas neimageble speciala evento: malofta, bela, kaj nekomparebla al io ajn alia. Ĝi nekredeble impresas ĉiun, kiu ĝin ĉeestas. Ne temas nur pri la nekutima aspekto de la Suno dum tiu mallonga momento. Ĝi estas speciala travivaĵo, dum kiu oni sentas kvazaŭ oni direkte tuŝas la misteron de la Universo.

La evento estas tre kompleksa. En la mezo de la tago ĉielo mallumiĝas, ekaperas steloj, videbliĝas strangaj ombroj kaj koloroj, aero subite malvarmiĝas, okazas subitaj ventoj, birdoj kaj aliaj animaloj konfuziĝas, aperas nekutima kvieto. Homoj montras nekonvenajn emociojn. Kelkaj tute eksilentas, dum aliaj rave ekkrias.

Rigardi la nigran sunon vestitan en la hela krono estas sufiĉe impresa. Tion oni nemalofte vidas sur ies fotoj, sed ofte ne bone komprenas. Estas neforgeseble mem observi la movon de la nevidebla Luno malrapide trapasanta antaŭ la sundisko kaj laŭgrade kvazaŭ "formangxanta" ĝin – ĝis abrupte la paro transformiĝas en ion tute malsaman. Subite oni ekvidas la nigran diskon ĉirkaŭitan de la brila sunkrono. Tiam la precizeco de la mekanismo de la astrojoj fariĝas evidenta kaj ravigas.

La foto aŭ filmo ne estas la samo kiel senpera travivado de la tuta kosma spektaklo, troviĝante en la ĝusta tempo en la ĝusta loko sur la terglobo. Tio estas multe pli ol la bela vidaĵo. Tial amasoj da homoj volas vojaĝi al foje distancaj regionoj por eniĝi en tiun raran fenomenon de la Totala Suneklipso kaj persone ĝui ĝin.

Mi jam vidis la Totalan Suneklipson unufoje kiel knabo, loĝante en Pollando en 1954 jaro. Tial ĉi-jare mi decidis reveni pli frue el Koreio post la Universala Kongreso, por refoje sperti la Totalan Suneklipson, nun okazinta proksime al mia nuna hejmo en Ilinojso. *–d-ro Les Kordylewski*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**24-an de Oktobro** – Preparado al Zamemnhofa Tago kaj jubilea ekspozicio

**28-an de Novembro** – La temo estos anoncata

**17-an de Decembro** – Zamenhofa Tago – La loko estos anoncata

# Suneklipso (2) *de d-ro Rostislav Tverdostup*

Pri mia sperto de la plena suneklipso. Ni ekplanis la vojaĝon antaŭ unu jaro. Dum la longa tempo ni (kun edzino) kalkulis, kien iri. Rezulte, ni trovis nin en vilaĝeto de Ilinojso, kie estis nur unu poŝtoficejo, ene de unu bestfarmo. Ni forfuĝis eĉ de unu nubeto, por nenio malhelpos nin rigardi tiun ĉi naturan miraklon. Kaj rigardi en arbaro, en la sino de l' nature estis la plej bona loko, ĉar ni havis ŝancon senti, kiel vivanta mondo reagas. Ĝis la suneklipso ni aŭdis kutiman krakadon de cikadoj kaj birdo-pepadon.

Je kelkaj minutoj antaŭ la plena mallumo ili ĉiuj eksilentis kvazaŭ maltrankviligitaj de la okazaĵo. Sed kiam tute mallumiĝia kaj ekaperis steloj, ili ekkrakis kiel frenezaj, sed kun alia sia "motivo", la nokta. Moskitoj ekatakis nin ĝgissate mordis infanojn. Sento estis absolute mistika. Dum la blanka tago ekmallumiĝis, ekmalvarmiĝis, ekaperis steloj kaj observe de sun-krono sen specialaj okulvitroj estas sperto de la tuta vivo. Kaj tio rekompensis ĉiujn minutojn de la 15-hora (nur unu-direkta) vojaĝo de kanada Toronto.





# Peto *Inf. Tina Seastrom, Sekretariino*

Nia multjara samideano (nevidanta), gitar-, harmonik-, piano-ludanto Byron Eguiguren volus havi E-vizitantojn. La plej bona tempo – vespere.

Li loĝas nun ĉe la aĝulejo "Citadel", 432 Poplar Dr., Wilmette, IL, (847) 256-5000. Li ŝatas ludi por vi kaj babili Esperante. Anticipe dankon!